

Gazeto *Andaluzia*

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

10-a Jarkolekto ■ Decembro, 1993 ■

N-ro 36



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4^º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. IMPRIME: COPICENTRO, Alameda Principal, 42, Málaga

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO, José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

ENHAVO

Efika Esperantismo / 3	3
TAKE: Esperantistaj Konstruistoj	4
53a Hispana Kongreso de Esperanto	5
Poezia Angulo	8
Krucvortoj	10
10 sciindaj asperktoj pri...	11
Plia komerca propono	12
Germana Kleriga Instituto	13
E=mc ²	14
Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?	15
Polo ekkonas okcidentan ekonomion	16
Pola Radio	17
Kaŝitaj vortoj	19
Esperanto Aplikata	20

En ĉi tiu lasta numero de la jaro, Gazeto Andaluzia ŝanĝiĝis. La teknika kunlaboro kiu la redaktoroj havis kun la Malaga Universitato, cele al la kompostado de la revuo finiĝis, kaj nun oni uzas personan komputilon, ni devis uzi aliajn programojn, kaj do, ni decidis iom ŝanĝi la prezentadon de AEU, uzante pli legeblan litertipon. Kiel vi povos legi, oni eklaboris, cele al la 53a Hispana Kongreso, okazonta somere en Malago. Pri tio, kaj pri aliaj aspektoj de Esperanto, legu en via revuo...

Etika Esperantismo /3

Zamenhof en sia parolado de la Sesa Kongreso 1910 en Waghington diris pri la esperantismo: "Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono." Per malmultaj frazoj de Zamenhof, ni povas vidi tutan programon pri la laborado kaj celo de la esperantismo. En ĝi la lingvo Esperanto havas nur sekundaran rolon, la lingvo estas la ilo por disvastigi la senton kaj la ideon de homarunuigo, ideo tiel vasta kaj grandioza kiel por enkonduki novan civilizacion.

En 1910 ankoraŭ ne estis antaŭvidita la Unua Mondmilito nek la Dua nek la enorma scienca kaj teknika prospero nek la malkovro de la atomenergio. Tiam la homarunuigo estis revo idealo, sed nun tiu idealo jam fariĝis trudita realo. Aŭ ni la homoj unuigo laŭ tiu vidpunkto de unueco en la diverseco aŭ nia nuna civilizacio disfalos en ĥaoson, aŭ en unu solan imperion aŭ okaze de atommilito eĉ en pereigon de la homaro. Nuntempe, tiu revo pri unuigo de la homaro jam delasis esti idealismo por fariĝi realismo, jam delasis esti revo de kelkaj iluziuloj por fariĝi devo de ĉiuj.

Jen la civilizacia krizo de nia tempo. Materiale jam ekzistas la monduuigo: la milito kaj la paco, la ekonomia prospero aŭ la ekonomiaj krizoj, la ekologia zorgo, ĉio tio jam tutmonde estas reciproke interdependa, sed al tiu monduuigo ne respondas homarunuigo.

La materila monduuigo alvenis tute sola pro la sekvo de la okazaĵoj mem. La industriigo disvolviĝis en Britio antaŭ ol du jarcentoj, sekve alvenis la vaporŝipo kaj la fervojo kaj ili en la pasinta jarcento disvastiĝis tutmonde. Pro tiuj komunikiloj la mondo reduktiĝis: geografia baroj malaperis, la distancoj de monatoj reduktiĝis al tagoj. En nia jarcento aperis la aviado kaj la distancoj de tagoj reduktiĝis al horoj. Ankaŭ aperis la radio kaj la televido. La vivado delasis esti la tradicia en ĉiuj lokoj kaj la moroj ĥaosiĝis. En du jarcentoj la vivo de plejparte kamparana transformiĝis en urba, kaj la urbegoj en ĉiuj partoj de la mondo estas similaj kaj simila ankaŭ estas la mekanikigo de la hejmo. La homoj estas materiale unuigitaj laŭ homamasoj kaj pro tio aperis disigaj fortoj. Anstataŭ la homoj celi la homarunuigon en la unueco kun la diverseco, aperas kontraŭantaj disigaj fortoj rigardantaj idealigitan pasintecon. Oni revas pri la perdita pasinteco kaj kreskas la etna sendependismo, revante ĉiu etno por havi propran ŝtateton. Tiu mensoteniĝo estas reakcia kaj celas, tute kontraŭe al la monduuigo, reveni al la mezepoko. Tio ne aŭguras pacon nek prosperon, nur enlandaj militojn kondukantaj al ĥaoso simila al la disfalo de la Romia imperio.

Se UN klopodas nun por malebligi trian mondmiliton, sur la kampo de la internaj militoj malsukcesas, ĉar tio necesa antaŭ ĉio estas la ŝanĝo de mensoteniĝoj. Bedaŭrinde preskaŭ neniu okupiĝas pri tiu ŝanĝo de mensoteniĝo, eĉ ni esperantistoj, kvankam tiu agado estas

precize la interna ideo de la esperantismo kaj en plej alta grado la homaranismo de Zamenhof.

Ni esperantistoj faras multajn kursojn de la lingvo Esperanto, havas grandan stokon da diversgradaj gramatikoj, en niaj vicoj estas multaj poetoj, nia romana literaturo estas pli ol kontentiga, sed ĉiu el ni kaj ĉiuj kune vivas izolitaj en nia ebura turo, apartaj de la historiaj kaj homaraj eventoj, pri tiuj ĉi ni diras nenion.

La laborado por la homarunuigo estas nia laborado, kaj ni el la ebura turo devas malsupreniri sur la arenon de la mondo kaj entrepreni la imponan taskon enkonduki per ŝanĝo de la nuntempa ĝenerala mensoteniĝo, la homarunuigon. La historia rolo de la esperantismo fariĝis tiel grandioza kiel por enkonduki universalan civilizacion.

Giordano Moya

TAKE: Esperantistaj Konstruistoj

Sub la direktado de Michel Basso kaj kun la helpo de Jean Pierre Cancel, inĝeniero pri komerco, la fondgrupo de la asocio elpensis merkatesploran strategion, kio maloftas ĉe domkonstruistoj, kaj des pli en asociol

La strategio konsistas en tri punktoj:

1. Ellaboro de demandaro, cele al kiel eble plej taŭga precizigo de la bezonoj de la

2. Adoptado de la sciigitaj bezonoj al la celoj kaj rimedoj de la kreata asocio.

3. Starigo de strukturita agada programo.

170 enketiloj estas senditaj kaj 47% de la respondintoj tre rapide montris intereson. 44 landoj povus konsistigi potencialan merkaton. Ni atendu la definitivajn rezultojn.

Post la unua fazo finota per ekonomika analizo ni transiros al la dua paŝo: la oficiala kreo de TAKE.

Michel Basso

Se la projekto interesas vin, bonvolu kontakti:


TAKE

RN 83 - rue de Tiefenbach

F68920 WINTZENHEIM, Francio

Telefono 89.79.79.92, telefakso

89.79.79.93.



estontaj membroj de TAKE.

53a Hispana Kongreso de Esperanto

La esperantigo de la socio

Okaze de la esperigaj sukcesoj lastatempe atingitaj de konkretaj esperantistaj grupoj en Eŭropo kaj en Azio en la komerca, scienca, politika kaj turisma kampoj, mi alvokas la ceterajn samideanojn pripensi la situacion kiun oni travivas en Esperantujo.

Grandega entrepreno, kia ĝenerala aplikado de nia internacia lingvo en la tuta mondo, postulas seriozajn kaj ekŝerpigajn studojn. Preskaŭ ĉiam, niajn renkontiĝojn karakterizas konformismo, memkontentigo pro iuj kulturaj atingoj kaj defetismo pri la ebleco sukcesi ekster niaj propraj randoj. En tiaj cirkonstancoj, la prognozo estas certa: se renovigaj esperantistaj grupoj ne agadas profesie por Esperanto kaj se ili ne kapablas unuigi la esperantistaron cele al la atingo de pli profunda esperantigo de la kulturo kaj la ekonomio, la ruiniĝo de la Esperantismo alvenos.

Hodiaŭ granda nombro da samideanoj vivas sian esperantistecon dorse de la socia realo kaj, kompreneble, ilia argumentado tute senvaloras kaj, ne malofte, provokas alies mokojn. Ili intencas konvinki pri la neceso altrudi al la socio nian internacian lingvon (foje, eĉ alian planlingvon) kaj, samtempe, montriĝas malkuraĝaj kaj malfidas la eblecon uzi Esperanton por perlabori panon. Aliaj vicas ĉe ni nur por turismi (se eble, malmultkoste). Ankaŭ ne mankas kiuj kontentiĝas per malgrandetaj sukcesoj atingataj de ilia E-klubo, kaj ne komprenas ke tio estas simpla esprimo de

rakita evoluo de ilia esperantisteco.

La esperantigo de la socio alvenos kiam abundos samideanoj aplikantaj la lingvon en ekonomio, scienco kaj kulturo. Ne atendu, ke la aliaj (la ekstermovadanoj) rekonu la bonecon de Esperanto kaj risku sian monon kaj prestiĝon uzante ĝin, se antaŭe ni mem ne faris kion ni postulas de la ceteruloj. Esperantismo bezonas monon kaj kapablulojn. Apud la asocioj kaj la E-grupoj, la esperantistaro devas funkciigi kooperativajn aŭ alispecajn entreprenojn kiuj subtenu mone kaj pravigu la Movadon. Atendi ke la registaroj solvu nian malkontentigan situacion estas simpla memtrompiĝo.

En Esperantujo mankas valoraj sociologiaj studoj pri aferoj rekte rilataj al la Movado. Ŝajne, esplori nian realon tiel timigas nin, ke neniu kuraĝas plenumi tiun taskon kaj tio malsanigas senĉese la esperantajn etosojn. Tial estas nepre ne plufanfaroni, alfronti la situacion respondece kaj plani la estontan agadon tute akorde kun niaj celoj kaj la socio en kiu ni ĉeestas.

La venonta Kongreso de HEF

Inter ni tute mankas daŭraj organizoj kiuj prizorgu la sciencan esploron de la Esperanta realo kaj la individuaj iniciatoj fiaskas jen pro miskompreno de la ceteruloj, jen pro maltrafo pri la strategioj kaj metodoj proponitaj cele al solvo de niaj problemoj, jen pro ambaŭ motivoj. Do, konvenas profiti maksimume niajn kongresojn kaj la pli-malpli amasajn renkontiĝojn por, helpe de ĉiuj, serĉi efikajn rimedojn kiuj ebligu daŭran kaj

respektindan aplikadon de nia internacia lingvo ene de la socio.

La malfortigo de la Movado montriĝas interne (ĉar ene de ĝi mankas mono, klereco, kuraĝo kaj sukcesigaj organizoj) kaj ekstere (ĉar la politikaj partioj, la pastraro, la sindikatoj, la publikaj edukaj instancoj, la privataj klerigaj rondoj kaj la komercaj, sciencaj kaj ekonomiaj medioj apenaŭ valoras la rolon de Esperanto en la socio. Kvankam tio malplaĉas nin, ni devas rekoni ke la kialoj de tiu malbona situacio devenas

kaj de la Movado kaj de la Socio. Do, la solvoj fontu de ambaŭ. Tamen, ĉar nenio ŝanĝiĝos favore al Esperanto, se ni ne gvidas trafe la ŝanĝon, la laborprogramo de la venonta kongreso de HEF okazos baze ene de la specifaj laborgrupoj sine de kiuj oni studos ĉion rilatan al la

respondaj temoj.

Por atingi la plej altan fakan nivelon, estas nepre ke ĉiu laborgrupo estu gvidata de kiel eble plej kompetenta persono kaj ke ĉiu samideano alportu siajn opiniojn rilatajn al la temo elektita.

Baza reformo, kia la bezonata en Esperantujo, postulas ĉies partoprenon. Tial tre utilos, ke la plej granda nombro da samideanoj alportu sian kunlaboron kaj, ĉar bedaŭrinde ne malofte multaj personoj timas paroli publike, oni petas, ke ĉiu kongresano prezentu siajn sugestojn kaj proponojn skribe al la koncerna komisiitaro antaŭ/dum la kongreso. Tiamaniere, pliiĝos la intereso

kaj la eblecoj trovi taŭgajn solvojn al niaj problemoj.

La organiza komitato dankas ĉies sugestojn kaj petas, ke ĉiu samideano preta gvidi ajnan laborgrupon en la venonta kongreso sciigu plej baldaŭ la prezidanton de LKK pri sia intenco. Cetere, kvankam la LKK proponas ke la studoj, informoj kaj debatoj rilatos rekte al politiko, kulturo, ekonomio, sindikatoj, religio kaj edukado, ajna esperantisto rajtas proponi aliajn temojn por pritakti



ilin. Tio estas necesa por aranĝi efike la laboron.

En la venonta numero, la LKK informos ankaŭ pri la amuzaj aranĝoj programitaj, ĉar en la kongreso ĉiu persono disponos du paralelajn programojn: unu el ili estos amuza kaj la alia konsistos, baze, el laborkunvenoj.

Por kontakti la Lokan Organizan Komitaton turnu vin al:

Poŝta adreso: AEU, poŝtkesto 864, E-29080 Malago

Telefono: 95-2250976, 95-2306708

Fakso: 95-2250976

Interesaj flankoj de la Movado:

- 1.- Interne:
 - ekonomia
 - klera
 - morala
 - organiza
- 2.- Ekstere
 - Rilatoj kun
 - politikaj partioj
 - pastraro
 - sindikatoj
 - publikaj edukaj kaj kulturaj
instancoj
 - privataj kulturaj organizoj
 - ekonomiaj etosoj
- 3.- Kialoj devenantaj el
la Movado
la Socio
- 4.- Solvoj devenantaj el
la Movado
la Socio

Du programoj

Laborprogramo

Enkonduka kaj priskriba Ĝenerala Asembleo

Informoj pri

Ekonomio kaj Esperanto

Politiko kaj Esperanto

Edukaj instancoj kaj Esperanto

Religio kaj Esperanto

Sindikatoj kaj Esperanto

Kulturo kaj Esperanto

PriEsperanta Kulturo

Kunvenoj de laborgrupoj (ĉiutaga kaj fakaj)

Diskuta Ĝenerala Asembleo

Agadplano reviziota ĉiujare

Amuzprogramo

Ekskursoj, stando, koncerto, konkursoj...

Andrés Martín
Prezidanto de LKK



**La Estraro de AEU
deziras al siaj anoj**

Feliĉan 1994!

Poezia Ĥungulo

Ekde nun, ni klopodos oferi al vi, en ĉi tiu angulo de via revuo, ne nur klasikajn poemojn de la Esperanta literaturo, sed ankaŭ poemojn de andaluzaj poetoj kaj (se ni ricevas) originalaĵojn.

ASTRO

Mortis la flor', la floron kiun amas l'amanto
mortis l'amanto, amata de la luno,
la luno restas -kulmita soleco-
flor', amanto, memoro...

NUDA

Mi estas nuda, la suno fajre diras
kion dirus la enamigata homo.
Sufiĉas la silento por konfesi ĉion,
se kuŝata en la bordo de iu rivero
la homo silentas kaj en sia brusto, muta,
suno kiel tiu de l' ĉielo brilegas.
Ni jam scias ĉion. Ke estas ruĝaj
la lipoj kiuj kisiĝas en la bordo,
ke la vivo estas nedaŭra kaj dolĉa ĉirkaŭbrako
kaj ke kun la mateno ĝojo
sennoma invadas nin silente.
Ni jam ne bezonas la vortojn.
Jam sufiĉas la sun' kiu kisas, sufiĉas la rivero
kiu portas nin en siaj ondoj nerapide,
la vento kiu l'okulojn karesas,
la verda ombro kiu en la buŝo tremas.

Ricardo MOLINA, kordova poeto, estis unu el la plej gravaj reprezentantoj de la generacio de Cántico, poezia revuo publikigita en Kordovo en la kvindekaj jaroj.



DESPERANTO

Dolĉe sonas via nova nomo
ho Esperol nia bela vortol
En la nokto plena je sopiro
vi, Espero, estas eliksiro,
se nur eliksiro sen la forto.

Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,
kiel kontraŭ superakvo muro,
se vi estas sabla bariero,
ĉiam disfalanta en aero,
sed ni kredas je vi sen murmuro.

Tre agrabla vere estas sonĝo,
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,
pri senĉesa homa harmonio,
unu amo, unu familio,
sukeraĵo por la infaneco.


Ni atendas vane tempon belan,
kiam regos sole via nomo.
En eterna monda karuselo,
vi Espero restos ĉiam stelo,
ĉiam malproksima por la homo.

Eĉ se iam jena tempo venas
post jarmiloj, kaj post miliardo,
tiam reen homon batos homo,
sed li batos lin en via nomo -
ankaŭ kun la stelo sur standardo.

S. Schulhof (1864-1919) estis ĉeĥa dentkuracisto, kiu verkis poemojn en la ĉeĥa antaŭ sia esperantistiĝo. 57jara, aperis lia unua poemvolumeto (poste aperis du pliaj volumoj kun originalaj, kaj alia kun tradukitaj poemoj).

Li estis la unua lirikisto kiu per sia persona voĉo povis vekti veran emocion pere de Esperanto. El liaj poemoj almenaŭ la duono estas matura, korvarmiga poezio.

Krucvortoj



Horizontale:

1. Ĉefa ĉambro en domo. 4. Unua sezono de la jaro estas la -tempo. 6. Ronda plataĵo por gramofono. 7. Boligi malrapide. 9. La tuta loĝantaro de iu lando. 12. Plena de viveco kaj vigleco. 15. Nombro da jaroj, tra kiuj oni vivas. 17. Koloro. 20. Izolita peco de tero. 23. Akir'. 24. Laŭtaj, malplaĉaj sonoj. 25. Kuri kukon. 26. La enloĝantoj de Britio.

Vertikale:

2. Homo amata. 3. Frato de la patro aŭ patrino. 4. Demandas iun servon. 5. Id' de homo. 8. Vivas en certa loko. 9. Prepozicio kiu montras la *ilon*. 10. Presita paperfoli'. 11. Difinita artikolo. 13. Estu amika al! 14. Membro. 16. Sufikso kiu montras *fraccion*. 18. Uzinda. 19. Ricevi por mono. 21. Ĉirkaŭrigardi por io perdita. 22. Reĝo de la bestoj.

Neniu leganto de *Gazeto Andaluzia* sendis al la redaktoro la korekta solvo de la krucvortoj lastnumeraj. Sed vi denove povos gajni du librojn, *Sur la linio*, de Georgo Kamaĉo, kaj *La stultaj infanoj* de A. M. Matute, se vi sendas al ni la solvon de la supra krucvorto.

Ekl kaj sendu la respondon al la redaktoro, J.F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, antaŭ la 28a de februaro.

10 Sciindaj aspektoj pri...

... Andaluzio kaj la esperantismo

1. La vorto *esperanto* bedaŭrinde ne aperas en la verko *Gran Enciclopedia de Andalucía*, eldonita de la eldonejo Argantonio. Tamen, en la paĝo 1675, 4a tomo, oni mencias sub la nomo *Garzón Ruiz, José*, ke li estis la direktoro de la esperantistaj revuoj *Gazeto Andaluza* kaj *Gazeto Hispana*, krom la verkisto de kelkaj E-libroj.

2. *Gazeto Andaluza* nuntempe estas la sola revuo eldonita en Andaluzio esperantlingve. Sed antaŭ kelkaj jaroj oni eldonis revuojn kiel *Andaluzio*, *Revuo de Sejo* kaj *Ĉiesrevuino* en Seviljo, *La Cenaĉero* en Malago kaj *La Kordova Esperantisto* en Kordovo.

3. En Andaluzio ekzistas profesia kantisto kiu muzikas en esperanto. Temas pri Solo, malaga samideano, kiu ĝis nun jam rolis sian muzikon en kelkaj E-kunvenoj kaj eldonis diskon *Kosmoinfano*.

4. Ĝis nun, Federico García Lorca estas la ununura andaluzia aŭtoro kies verkoj estas tradukitaj en esperanton. Konkrete, *La Cigana Romancero*, *Sanga Nupto* kaj *La Domo de Bernarda Alba*. Kompreneble, ĉi verkoj troveblas ankaŭ en la Domo-Muzeo de García Lorca en Fuentevaqueros (Granado).

5. Blas Infante, la patro de la andaluzia naciismo, estis ankaŭ esperantisto. Li aliĝis al la Universala Esperanto-Asocio en 1921, ĉi konitaĵo kaj eĉ la propra membro-karto aperas en kelkaj verkoj pri ĉi politikisto.

6. Nuntempe ekzistas strato *Esperanto* en Malago kaj avenuo *Esperanto* en Torokso (Malago). Dum la tridekaj jaroj ankaŭ ekzistis strato *de la Doktoro Zamenhof* en Kadizo.

7. Laŭ niaj konitaĵoj nuntempe ne loĝas esperantistoj en Gibraltaro, sed en la jaro 1907 fondiĝis en tiu urbo Esperantista Societo, la dua en Andaluzio post tiu de San Fernando.

8. La andaluziaj kongresoj ne estas nur nuntempa okazigo, jam en laŭ jaroj dekaj kaj dudekaj renkontighis la samideanoj en 4 regionaj kongresoj, ĉiuj okazitaj en Seviljo.

9. La unua persono kiu nomiĝis *Esperanto* en la mondo estis andaluzo. Li estis la filo de José Garzón Ruiz, konata kadiza esperantisto en la unuaj jaroj de nia jarcento.

10. La unua libro-metodo pri Esperanto por hispanoj publikigis en 1890 en Malago, fare de la profesoro José Rodríguez Huertas, kiu poste instruis la lingvon en sia urbo. La lingvo de ĉi tiu libro ne estas pura Esperanto, male ĝi entenas kelkajn modifojn aperigitajn de la propra Rodríguez Huertas.

Plia komerca propono

En Hungario ekfunkciis en 1992 la merkatesplora perada agentejo MBC, kiu dum la c. unujara ekzisto atingis tiel grandan sukceson enlande, ke ĝi jam planas la disvastigon de sia agado kaj servoj ankaŭ al eksterlando, unuavice al Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Ukrainio.

Ĉar ankaŭ mi mem apartenas al la agenta reto de firmao MBC, kaj ĉar mi jam informiĝis pri la intenco de disvastiĝo, mi lanĉas la unikan eblecon al vi, ke ni kunlaboru pere de Esperanto en la eksterlanda sukcesigo de MBC, kompreneble tiel, ke via kunlaboro donu ankaŭ al vi bonan profiton por via laboro.

La konkreta servo de la firmao MBC estas la racia kontaktigo, reciproke avantaĝa partnerigo de vendistoj kaj aĉetantoj en la plej vasta senco de la vorto. La firmao prilaboris kaj enkondukis tre racian kaj allogan sistemon de ebleco por doni konstantan rabaton al aĉetantoj de diversaj varoj kaj servoj, kondiĉe, ke ili aliĝas al anaro de posedantoj de arĝentaj, respektive oraj kartoj, vendataj fare de la firmao MBC. La opaj vendistoj mem povas difini, kiom da procentoj da rabato oni donas al karto-posedantoj, ĝi averaĝe estas c. 10% en Hungario. La rabato ne dependas de la suma valoro de la aĉetado, kaj la karto validas dum 5 jaroj. La prezo estas tiom korekta, ke averaĝa familio povas regajni ĝian prezon pro la akiritaj rabatoj jam dum malpli ol unu jaro.

Por vendistoj de varoj kaj servoj la sistemo estas same tre avantaĝa, ja ili akiras el tiuj karto-posedantoj konstantan regulan aĉetantaron, kiujn instigas la konstanta rabato regule aĉeti en tiu rabatdona vendejo. Eĉ se la vendejo vendas la varojn kun iom da rabato, la regule vendataj pli grandaj kvantoj certigas la pli grandan profiton, kaj forigas la bezonon fari sezonfinajn, porokazajn disvendojn de amasiĝintaj varoj kun granda, ofte 30-40% rabato. Ties avantaĝo estas evidenta el ekonomia kaj komerca vidpunkto.

La informado pri rabatdonaj vendejoj por karto-posedantoj estas tre majstre kaj regule solvita, samkiel la kondiĉoj kaj reguloj de la korekta funkciado de tiu ĉi sistemo, kiu facile estas adaptebla al aliaj landoj.

La aliĝigo al tiu ĉi rabata sistemo ĉu por vendantoj, ĉu por aĉetantoj okazas pere de bone inventita kaj funkcia sistemo de multnivela enmarketigo, kiu certigas bonegan profiton al lertaj agentoj kiuj aktivis en la varbado.

Nun mi volis nur tiom diri tre koncize pri la afero, por informiĝi, ĉu la afero povus vin interesi aŭ ne. Ĉu vi volas gajni multe da mono? Bonvolu kunlabori!

Nun ni serĉas unuavice tian firmaon en la menciitaj landoj, kiu pretas fondi miksan entreprenon kun firmao MBC por solvi la plej facilan kaj ekonomian enkondukon de tiu ĉi servo en la supraj landoj.

Se la entreprenema firmao ne estas mem uzanto de Esperanto, estas des pli bone, ni povas doni pli altan rangon kaj reputacion al Esperanto, se ni povas tiel kunlabori.

Se ni povas trovi la entrepreneman kaj konvenan firmaon, kiun MBC povas akcepti kiel partneron, baldaŭ povos sekvi la konkretaj traktadoj kaj konkretaj paŝoj por plej baldaŭ solvi la ĵurajn, teknikajn, ktp. detalojn de la internacia kunlaboro.

La informo estas granda valoro. Vi nun ricevis informon. Se vi rapide utiligas ĝin, vi povas esti kiu multe rikoltas. Bonvolu do informiĝi ĉe vi, kaj informi min, la afero ne estas bagatela. En Hungario rikoltis grandegan sukceson, kiu estas ne nur morala, sed ankaŭ financa sukceso por ĉiuj kunlaborantoj aktivaj!

Se la kunlaboro en tiu ĉi afero interesas vin, respektive vi povas trovi firmaon en via lando por fondo de miksa entrepreno, bonvolu informi min. Tiukaze jam havos sencon traduki al Esperanto la materialon de MBC, kaj sendi al vi, ekzemple por detala trastudo kaj traduko al via nacia lingvo.

Kunlaborante kun ni, via minimuma ŝanco estas tio, ke vi povas fariĝi agento en via lando inter la plej unuaj, do havi lokon proksime al la pinto de piramido de multnivela enmarketigo. Tio donas bonan profiton al vi, kiu eĉ de tempo al tempo kreskos, kun la kresko de nombro de kunlaborantoj.

Mi esperas, ke tiun ĉi informilon vi akceptos favore, kaj vi ne taksos tiel, ke mi volas ion ajn altrudi al vi, ja vere mi ne havas tian intencon.

Mi petas vin, nepre kaj tre baldaŭ sendi al mi respondon, estu via respondo ĉu positiva, ĉu negativa, ĉar ni ne povas longe atendi, se ni volas sukceson.

Mi multe ĝojus, se vi informus min kiaj ĵuraj, teknikaj, financaj, impostaj, ktp. kondiĉoj regas nun en via lando, al kiuj MBC devos adaptiĝi. Kiuj estas la kondiĉoj de la fondo de komuna entrepreno? Kiamaniere tion eblas fari ĉe vi? Mi multege fidus kaj esperas pri via kunlaboremo kaj aktiveco!

Bajáki Imre

Germana Kleriga Institucio

En la jaro 1990 la profesoro D-ro sc. oec. Ing. R. Auerswald malfermis la "Euro Education" (eŭropa edukado), eŭropa akademio por pluevoluo, scienca konsultado kaj perado.

Pere de tia moderna kleriga institucio tiu profesoro kaj liaj kunlaborantoj preparis kaj preparas multajn senlaborulojn kun akademia edukado pri la novaj merkataj cirkunstancoj kaj preparas ilin pere de multvaloraj finaj ekzamenoj pri taskoj en la industria kaj serva sektoro. Multegaj aprobitoj ricevis post la fino de la kursoj novan laborlokon kaj agadas nun efektive en multaj sferoj de la ekonomio.

La studentoj de "Euro Education" eklernas specialan managheran scion pere de la praktiko en la ekonomio aŭ en la ekonomia laborejo "Euro Tech".

Tiu entrepren-ekonomia laborejo estas membro de grupo de tiaj laborejoj kaj simulas la managheradon de iu firmo ekde la preparado de la produktado pere de la produktado ĝis la aliaj taskoj (inkluzive de la disvendo kaj kontaktoj kun bankoj, ktp.) Por efektivi kaj valorigi la kvalifikadon pri praktikaj elementoj naskighis nova ideo en kies realigo nun oni agadas.

Pere de interrilatoj kun la firmo "Verdichter Service GmbH Chemnitz", iu projekta grupo de tiu entrepren-ekonomia laborejo havas la taskon rekonstrui unu post la jaro 1989 fininte produktadan profilon kaj managheri tion en propra respondeco. La grupo perlaboras merkatan analizon por sia produktado.

Pere de multampleksa en- kaj eksterlanda konsulto oni volas esplori firmojn kiujn eble interesas la acheto kaj uzo de "teknikaj kribriiloj".

Tiuj kribriiloj povos esti faritaj laŭmase kaj laŭgrande rapide kaj malmultekoste de la firma "Verdichter Service GmbH Chemnitz".

Sur la bazo de tiu analizo la projekta grupo faras chiajn teknologiajn kaj enterpren-ekonomiajn dokumentojn kaj ekfunkciigas la produktadon. La celo de la projekto estas la konstruo de la nova produkta linio kaj poste la memstara organizo de la tuta procezo. Pere de tio oni enmetas la tutan studentaron rekte en la ekonomian procezon kaj la studentoj jam povas uzi konkretajn spertojn en estontaj agadoj.

Per tiu interesa irado sur la eduka sektoro, Euro Education komencas pli altan nivelon de la edukado kiu tute ebligas novan perspektivon kaj jam hodiaŭ montrighas sukcesplena.

Legantoj de ĉi tiu artikolo interesitaj en pluaj informoj pri la laboro de la projekta grupo (inkluzive de la produktado kaj disvendo de la kribriiloj) aŭ dezirantaj kunlabori kun la kleriga institucio "Euro Education" povos turni sin al la jena adreso:

Euro Education, Uferstr. 20, D-09111 Chemnitz (Germanio)



$$E = mc^2$$

En 1989 oni festis la dudekan datrevenon de la alveno al la Luno de la homoj. Okaze de tiuj aktoj la tiama usona prezidento George Bush anoncis la ellaboradon de projekto pri spaca esplorado, inter kies celoj estas la reveno de la homoj al la Luno por establi daŭrajn bazojn kaj ĉi tiel ekspluati la riĉajn rimedojn ĉefe mineralajn, de nia satelito.

Tamen, poste, la Usona Kongreso decidis ne liveri la necesajn ekonomiajn rimedojn por disvolvi, eĉ ne minimume, ĉi tiun projekton. Malgraŭ tio la NASA (Nacia Administrado pri Spaco kaj Aeronautiko) pere de tre malgranda buĝeto, atingis kunvenigi grupeton de inĝenieroj sub la nomo "Oficejo por la Spaca Esplorado". Ĉi grupo de sciencistoj jam ellaboris planon kie oni klarigas kiam, kiel kaj la necesajn kondiĉojn de la reveno de la homo al la Luno, temas pri la projekto FLO (Unua Luna Bazo).

Laŭ ĉi studprojekto la unua luna kolonio estos reala en la unua jardeko de la 21-a jarcento, iuj pli optimisme parolas eĉ pri la lastaj jaroj de nia jarcento. Unue estos necese realigi landkartajn studojn por fiksi kie establi la unuan bazon. Ĉi tiu bazo konstruiĝos post la lanĉado de kelkaj varo-raketoj por porti la necesajn ilojn kaj materialojn. Kaj poste aliaj raketoj kiuj portos la anojn de tiu unua bazo, apenaŭ grupeto de inĝeniero-astronaŭtoj, kiuj konstruos ĝin. Jam en la Luno la energion oni atingos pere de sunaj paneloj, kaj oni uzos malgrandajn grupojn kaj eĉ veturilojn, similajn al tiuj jam uzataj en la projekto Apolo, por vojaĝi fore de la bazo maksimume 20 kilometroj. Oni kalkulas ke ĉiu grupo de astronaŭtoj estos en la Luno proksimume dum unu monato kaj duono. La celo de la unuaj vojaĝoj estos konstrui spacan observejon kaj laboratorion pri suna fiziko kaj luna geologio. En postaj vojaĝoj oni konstruos eĉ ekflugejon por la spacaj veturiloj, simila al iu Tera flughaveno, kiu povos esti utila kiel helpa punkto por la proksima Stacidomo: La planedo Marso.

Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?

LINGVO ne estas celo (nur kiam oni studas ĝin literaturcele), sed ilo, komunikilo.

Edukado-instruado komplikigas: oni devas studi tro multe da fakoj, sed mankas tempo. Eŭropanoj ofte ne tiom perceptas tion, ĉar studo de alia eŭropa lingvo ne estas tiom malfacila por talentulo, sed por ĉinoj kun sia tute diferencstruktura lingvo tio estas grandega problemo. Estas severa handikapo kaj tiel rezultas en diskriminado: en la komunikado, en la negocado. Tio estas neakceptebla situacio. Zamenhof semis, la Esperanto-movado flegis, verdigis la planton. Nun venas la horo de la vero: la tempo por rikolti. Ĉu la planto portas fruktojn?

Multaj ĉinoj, sed ne nur ili, lernis la Internacian Lingvon pro praktikaj celoj. Kaj nun ili sin prezentas: "Ni volas rikolti." "Ni volas apliki Esperanton en ekonomio, komerco, aplikata scienco, tekniko."

Kaj nun montriĝas, ke Eŭropo, la lulilo de Esperanto, la sidejo de UEA, ne estas tiom progresinta. Ni ne estas pretaj! Ni ne bone faris nian taskon.

Kiel sonas unu mano aplaŭdanta?

La lingvo ne kulpas. Vi en Ĉinio faris la ĝustan elekton. Sed ne faru nian eraron; ne estu tro moderaj. Esperanto travivis jarcenton sukcese; ĝi pruvis sian utilon.

Postulu de viaj partneroj la aplikon de la Internacia Lingvo. Se ili ne volas kunlabori, donu al ili elekteblon: vi lernu aŭ Esperanton, aŭ la ĉinan. Donu pli favorajn negockondicojn al komercpartnero, kiu pretas negoci ĉu en Esperanto ĉu en la ĉina.

Postulu de UEA, ke ĝi sekvu vian filozofion

IKEF jam penas sed bezonas helpon.

Ĉina Aktiveco en Oostende montras, ke vi pravas. Vi elektis la ĝustan lokon por via prezentado: Benelukso estas la 4-a ekonomia potenco en la mondo, post Usono, Germanio kaj Japanio. Kaj en Belgio naskiĝis kaj loĝas la E.K., ido de Benelukso.

Ĝi estas la ĝusta loko por montri, ke ekonomia komunumo, celante internacian komercan kunlaboron, signifas ankaŭ aplikon de komuna lingvo, ne nur ene de la EK, sed speciale ekstere, precipe al nia partnero de la estonto: Ĉinio!

Kees Ruig. Nederlando
El *La Merkato*, okt. 1992

Polo ekkonas okcidentan ekonomion

Dum mia vizito en Germanio, Belgio kaj Francio mi renkontiĝis kun esperantistoj kaj, helpe de ili, kun oficistoj de komercaj ĉambroj kaj entreprenistoj. Tiuj ĉi renkontiĝoj donis al mi bildon de funkciado de entreprenoj en okcidenta Eŭropo.

Mi vidas, ke entreprenoj en okcidenta kaj orienta Eŭropo elkreskas sur tute aliaj fundamentoj kaj aliaj cirkonstancoj. Dum en oriento rapide kreskas malgrandaj entreprenoj kiuj laboras laŭ bezono de merkato kaj ŝanĝas sian specializecon, en okcidento ekde multe da jaroj ekzistas firmaoj kiuj regas kaj kreas merkaton. Ili devas ĉiam strebi por krei pli novajn, pli interesajn varojn. Ni en oriento povas facile krei proprajn entreprenojn malgraŭ manko de kapitalo, sed ni, malgrandaj entreprenistoj, ne estas konvenaj por okcidentaj firmaoj, kiuj, se temas pri eksporto-importo, kutimas havi grandajn mendojn.

Ĉe ni ne tiel ĝenerale "regas" angla lingvo. En internacia komerco ni jam uzas kontraktojn skribitajn nur en Esperanto, ĉar nia leĝo permesas tion fari kaj tie ĉi ekzistas firmaetoj kiujn posedas esperantistoj. Do ĉu ne venis tempo por fari pli?

Nun por nia internacia komerco ni bezonas fakturajn formularojn. Sur tiu ĉi kampo fakuloj el okcidento povus helpi al ni. Ankaŭ ni bezonas modelojn de internaciaj komercaj dokumentoj por eksporto-importo.

Unue gravan rolon povas plenumi

dulingva fakturo. Kia estas la ideo? Ĉiuj dulingvaj fakturoj devus havi en la sama loko la samajn surskribojn en Esperanto. Sube ĉiu surskribo devas havi tradukon en nacia lingvo. Traduko sendepende de la lingvo devas esti en la sama loko. Havante matricon de la fakturo, mi povas presigi fakturojn kaj sendi kelkajn al entrepreno kun kiu mi komercas. La samon (fakturojn kun lingvo de mia kunlaboranto) mi ricevos de ĝi. Kunmetinte dulingvajn fakturojn (kun pola lingvo kaj lingvo de eksterlanda entrepreno) mi skribas tion, kion mi bezonas kune sur mia pola kaj eksterlanda fakturoj. La unua restos ĉe mi (neniu oficisto kaj doganisto povas diri, ke li ne komprenas ĝin) kaj dua kun varoj veturas al eksterlando. Estos inverse kiam mi mendos kaj ricevos varojn.

Nun ni uzas diversajn fakturojn. Do ni bezonas taŭgajn, universalajn, modernajn modelojn. Ĉu inter IKEF-anoj estas kompetentuloj kiuj havas tempon por fari tion? Se ni sukcesos kun fakturoj, ni povas provi fari aliajn dokumentojn ankaŭ en Esperanto. Plej bezonata estas modelo de kontrakto en Esperanto inter orienta esperantista entrepreno kaj entrepreno en okcidento (ne neceso esperantista).

St. STASZEWSKI



Pola Radio

Pola Radio aŭdigas siajn Esperanto-elsendojn ĉiutage de la 4a de aprilo 1959. Nuntempe oni disaŭdigas du elsendojn:

15:30 h. - 31'50 m., 41'99m., 49'22 m., 200 m. (=9525, 7145, 6095, 1503 kHz)

22:30 h. - 41'18 m., 41'27 m., 49'22 m., 200 m. (=7825, 7270, 6095, 1503 kHz)

Se vi volas riveci la programaron de Pola Radio, skribu al :

Pola Radio
Esperanto-redakcio
00-950 Varsovio
P.O. Box 46



Pollando

Preskaŭ ĉio pri fungoj

Poloj apartenas al la nacioj, kiuj ne nur ŝatas, sed eble eĉ amegas la fungojn. Nu, laŭ gramatika vidpunkto ni ne troigu. Ni ŝatas fungojn, sen *la*, ĉar ja ne ĉiujn. Estas diversaj fungoj, ankaŭ venenaj. Poloj manĝas plej multe da flavboletoj, kantareloj, boletoj, brunaj boletoj, meleoj, kremplingoj, kvankam ĉi-lastaj estas iom venenaj. Nu, sed oni pretigas ilin tiel, ke ili perdas la venenon. En Pollando la fungoj kreskas sur diversaj lokoj, en diversaj grundoj kaj en diversaj klimataj kondiĉoj. Ili plej volonte kreskas en arbaroj, sed ili ne ŝatas tro malvarmajn lokojn, en tro seka aŭ tro varmega klimato. En la polaj klimataj kondiĉoj, ĉe favora vetero, fungoj naskiĝas abunde. Sed la diferencigado de la unuopaj specioj de fungoj ne ĉiam konformas al la scienca divido. La unuopaj ekzempleroj de la sama specio povas konsiderinde diferenci inter si depende de la kondiĉoj de la medio, en kiu ili elkreskis, kaj do - depende de la grundo, prisunigo, humideco, najbarado de aliaj plantoj. La polaj arbaroj abundas je granda riĉo de specioj de fungoj enhavantaj valoran por la sano potason, fosforon kaj vitaminojn. Sed bedaŭrinde, iuj el la fungo-specioj, similaj laŭaspekte al la manĝeblaj, enhavas fortan venenon. Je ĉirkaŭ 3000 fungo-specioj nur 1100 estas manĝeblaj. En Pollando oni kolektas ĉirkaŭ 300 fungo-speciojn.

Ĝis antaŭ nelonge oni alte taksis la

fungojn nur pro iliaj gustovaloroj. Tamen, danke al la sciencaj esploroj, estas hodiaŭ sciate, ke fungoj havas konsiderindajn nutrovalorojn, kaj ankaŭ kuracvalorojn. Ili enhavas multe da valoraj mikroelementoj, aminoacidoj, antibiotikaj substancoj, vitaminoj kaj de elementoj malkomponentaj kolesterolon kaj karakteriziĝantaj per kontraŭtumoraj proprecoj. La plej valora ĉirilate estas boleto, ne estas do mirige, ke ĝi okupas altan lokon en la hierarkio de la kolektado de fungoj. La utiligado de fungoj en la popola medicino kaj ankaŭ por kuir-celoj estas transdonata de generacio al generacio. Ekzemple oni opiniis, ke bovisteo, tio estas, polvofungo [likoperdo], enhavas proprecojn kontraŭ-hemoragiajn kaj vundokuracajn. Ĝis hodiaŭ en la Arbarego Sanktakruca en la centra Pollando estas kutimo porti en stalojn likoperdojn, ĉar onidire ili avantaĝe influas la naskojn ĉe bestoj.

La pruvo pri la atribulado de magia kaj sorĉa povo al la fungoj estas la antaŭjuĝoj ĉe la plukado de fungoj respektataj ĝis nun. En la vojevodio de Lublino (orienta Pollando) oni respektas la kutimon fari krucosignon antaŭ la plukado, sed oni ne preĝul ĉar la fungoj sin kaŝos sub la teron. En la vojevodio de Nowy Sacz (suda Pollando) la loĝantoj ne prenas likoperdojn permane, ĉar oni kredas, ke en tiuj lokoj elkreskos verukoj.

La pola kuirarto dankŝuldas al la fungoj multajn siajn ĉarmojn. De pratemoj la fungoj estas bazo por multaj pladoj. En la malnova pola kuirarto oni kutimis pretigi ilin kiel la ĉefpladon, kiel antaŭmanĝon kaj kiel la nepre necesan gustofaran ingrediencon por multaj saŭoj kaj supoj. La tradiciaj elementoj de la pola kristnaska vespermanĝo estas brasikaĵo kun fungoj, barĉo kun ravioloj farĉitaj per fungaĵo muelita, krome oni manĝas aparte raviolojn farĉitajn per fungaĵo. Tio estas postsekvo de la iama fungo-kulto.

En la pratemoj la fungojn oni utiligis en biendomoj aŭ aliaj kamparaj domoj por fortimigado de abeloj dum la forprenado de mielo el la abelujoj. En kelkaj regionoj oni uzis fungojn por lubriki aksojn de veturilaj radoj. Per la inkofungo koprino, post la forlavo de sableroj oni kutimis fari inkon. La fluaĵon oni spicis per iom da araba gumo kaj kelkaj gutoj da kariot-oleo. Onidire per tia inko skribis siajn verkojn la fama pola dramverkisto Aleksander Fredro.

La fungoj servas ankaŭ por antaŭanonci veteron, prognozi veteron. La abundo de la fungoj en la somera periodo antaŭdiras abundaj neĝojn kaj frostrajn vintrojn. Ankoraŭ hodiaŭ montaranoj prognozas veteron laŭ la sinsekvo de la aperado de fungoj. Kaj fine ri menciui, ke ĉe la ĉefa aŭtovojo de Varsovio ĝis Krynica Morska (suda Pollando) en la loko Piotrkowice, oni lokis panelon de la plej granda fungo de la mondo, kiun oni trovis en la tiea arbaro precize la 15an de septembro de 1977. La plej granda fungo pezis 15 kilogramojn kaj ĝia diametro egalas al tiu de ĉapelo.

Wiesława Ratyńska
elsendita de Pola Radio

Se vi ŝatas, kion vi aŭskultas en la radio, memoru ĉiam skribipoŝtkarton al la redakcio. Tiel vi kontribuos, ke ili daŭrigu siajn programojn!

Kaŝitaj vortoj

C	I	P	B	I	E	L	O	R	O	R	M	P	G	S	Ĝ	Ĉ	V
Ĉ	U	E	S	A	V	H	U	G	T	P	B	B	J	A	F	R	O
M	R	P	Z	H	E	L	J	K	L	O	K	R	V	F	J	K	R
O	N	L	V	P	I	Ĝ	T	R	O	P	Ĝ	E	N	T	P	E	O
C	L	L	D	L	R	J	E	U	B	Ŭ	C	M	O	O	B	U	T
S	B	A	O	F	R	E	Z	I	L	O	L	S	L	M	R	Ĝ	O
P	E	T	I	C	D	P	D	V	L	N	Ĉ	I	S	Ĝ	M	O	M
T	G	G	F	C	E	S	S	F	Ĝ	E	J	L	R	L	B	T	N
A	R	L	P	J	N	L	J	T	M	E	Ĝ	O	A	N	K	T	P
C	K	K	Ĉ	M	U	E	R	T	F	P	J	C	U	A	T	A	Ŭ
O	P	S	P	Ĝ	H	E	R	Z	N	V	V	E	B	P	M	Z	Z
A	M	Ĵ	O	P	Ĝ	Ĝ	J	E	Ĝ	J	Ĵ	C	I	B	R	R	K
N	O	C	K	E	S	C	H	I	F	D	R	P	N	R	B	U	D
P	K	B	K	B	H	U	Ĉ	M	S	I	A	T	G	L	D	L	F
R	V	N	O	R	I	N	R	A	C	K	D	K	O	U	Ĝ	C	K
I	J	G	Ĝ	U	J	O	G	N	I	R	O	T	S	I	P	E	Z
B	T	P	D	B	P	Ĝ	O	E	Ĵ	I	C	P	L	R	D	N	J
N	E	R	O	N	A	D	R	A	K	F	D	T	E	Z	R	O	R

Jen denove enigmo de kaŝitaj vortoj. Ĉi tiu estas alia ŝanco partopreni en la lotumo de du libroj, *Sur la linio*, de Georgo Kamaĉo, kaj *La stultaj infanoj*, de Ana M^a Matute. Trovu 15 vortojn pri iloj kaj...

... Sendu la respondon al la redaktoro, J.F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, antaŭ la 28a de februaro.

Esperanto Aplikata

Tradukoj el la franca kaj la kastilia en Esperanton. Andrés Martín, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Mi vendas loĝejon en Malago, en kvartalo Carretera de Cádiz, 4a etaĝo, kvar ĉambroj, kuirejo meblita, enmuraj ŝrankoj, blendita pordo, ĉio alumina. La loĝejo disponas propran telefonon. Prezo 6.600.000 pesetoj. Kontakto ĉe 958-258134 (de la 8a ĝis la 10a), 95-2315337. José Matos de Castro, Correos Entrega Inmediata, E-18070 Granada, Hispanio.

Modoj, desegnoj, pentraĵoj. Skribu al Raquel Martín Tovar, Armengual de la Mota 33, 4a D, 29007 Malago.

Survoje, dumonata revuo de UNIKO. Tre interesaj artikoloj de esperantistaj gravuloj. Vi povas komencia la abonon iam ajn. Peranto en Hispanio, Andrés Martín González, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Ĉu vi interesiĝas pri la *Esperant-Lingva Atlaso de Andaluzio*? Vi povas kontakti la kompilanto, José M. Rodríguez, Poŝtkesto 611, 14080 Kordova.

Kosmo-Infano, sondisko de Solo. Prezo 800 pesetoj. AEU, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Eventoj, internacia sendependa gazeto pri la esperanto-movado legata en pli ol 40 landoj. Aperas du semajne. Peranto en Hispanio, Juan Azcuénaga Vierna, Gral. Dávila 127,

7, 2ª izda., 39007 Santandero.

Oficialaj tradukoj el la angla hispanlingven. J. F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Ankaŭ tradukas el la franca kaj germana en esperanton aŭ en la hispanan. Tradukoj prilaboritaj per komputilo kaj presitaj altkvalite.

Anoncu senpage en *Gazeto Andaluzia* vian komercan aŭ profesion agadon. Sendu al Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio, vian anoncon.

Parolu pri niaj senpagaj anoncoj al esperantistoj kaj neesperantistoj. Per tio vi helpas pliigi la prestiĝon de Esperanto kaj ties Movado. Ĉiutage kreskas la nombro de samideanoj kiuj gajnas monon per nia internacia lingvo.

Marmoro, diamanta polvo, komputilaj sistemoj kaj programoj (dBase-tipaj); medicina spertoscio, kunlaboro tra komunaj entreprenoj. PVS, V.P. Prjaĥin, str. Kalinovsogo 49-59, 220086 Minsk, Belorusio; tel. 0172/630-865; fakso 0172/260-530.

Kunaj investoj en Ĉinio. Skribu al sro Han Yaohua, Wuhan Shi Wuchang Xian, Liufang Gongĝiaose, CN-430205 Ĉinio.

Eksporto de mielo: sro Rubon Rorres, Carrera 85 # 15-68, Cali, Kolombio. Importistoj aŭ perantoj skribu esperante, angle, hispane aŭ eĉ propralingve.

Komerco de aŭtoj kaj parto de aŭtoj.

Terenoj (6 ha ĉe grava vojo, apud lago, 30 ha malproksime de vojo) por turismo aŭ agrikulturo. Turismaj servoj kaj perado. Sro Stasys Kruzinauskas, Birutes 4-31, 4270, Vilkauskis, Litovio; tel.: 52989.

Metala zinkigita reto; aniloj; lignaĵo ronda (80-60 USD/kubaj metroj); ovoj, ova pulvoro; kazeino; sekigita lakto... Anstataŭ monpago estas akceptebla varinterŝanĝo. Sro Petro Harkavyj, "TTF", ab. k. 83, UA-282001, Ternopil, Ukrainio. Fakso 03522/31102.

Komercaj kontaktoj, turismo, komercaj vojaĝoj, importo-eksporto; firmao Oriento, P.O.Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistano. Tel. +7/3662/331753 (esperanto, angla, rusa).

Elektroaparato por produktado de vaflo je hejma kuirejo. Ĝi havas belan surfacon kovritan per hela kolora termorezista emajlo. Prezo: 5 usonaj dolaroj. Kvanto: 5000 pecoj je monato. Fabriko *Metalo*, Sverdlovskaja obl., urbo Nevjanks, str. Oktjabrskij 2, RUS-621170, Rusio. Telekso 721522 STAN SU, fakso 34356/22490, telefono 34356/21460.

Ni pretas kunlabori pri komercaj ekspozicioj, reprezentado kaj reklamado en Uzbekistano, gastroj de muzikensembloj kaj dancgrupoj, interŝanĝoj de entreprenistoj kaj aliaj fakuloj. Firmao *Kultura*, P.O. Box 76, 70300 Samarkand, Uzbekistano; telekso 116279 PTB SU, Vladimir Tybonik.

Vendas terenojn en Usono, Centrala

Florido; por domoj, 1700 kvadrataj metroj = 18900 dolaroj; por agrikulturo: 20000 kvadrataj metroj = 32500 dolaroj. Firmao Mini Max Business, Bl. 16 A, apt. 58. Gen. Stoletov Blvd, BG-1233 Sofio, Bulgario.

Internacia kompanio sen konkurenco interne merkato bezonas kunlaborant(in)ojn de rekta vendo, akordigebla kun iliaj devoj. Grandaj monaj eblecoj, laborante kun volo kaj ambicio. Pliaĝaj ol 22 jaroj. Skribu al Jerónimo Aguado, Apartado 2469, E-08080 Barcelono (Hispanio).

Ni peradas import-eksporton de ĉiuspecaj varoj, turismajn vojaĝojn kaj helpas al eksterlandaj aferistoj labori en Albanio. Firmao Albatreg, rr. Punetoret e Rilindjes, Pall. 2 sh. 4 ap. 63, Tirana, Albanio. Telefakso +355/42/23972.

Vi povas peti la kompletan programon de KCE per simpla poŝtkarta peto ĉe Kultura Centro Esperantista, pf. 779, CH-2301 La Chau-de-Fonds, Svislando.

Ni proponas ŝanĝi literaturon (ruslingve, germane, france, hispane, esperante). Esperanto-klubo, str. 60 let Oktjabrja 6, RUS-626440 Niĵnevartovs, Siberio, Rusio.

Mono, la nova esperanto-lingva gazeto pri la gajnado de mono. Abonebla ĉe *Monda Merkato*, pf. 1539, W-82355 Weilheim, Germanio, fakso +49/8809/1234

Monda Turismo - asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto. Petu nian programon ĉe Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094, Bydgoszcz, Pollando. Telefono +48/52/415744, fakso

+48/52/415115; telekso 562840 ETUR PL.

Interesitoj pri projekto de teksta procesoro *Leksikono* por samtempa laboro en la rusa, angla kaj Esperanto skribu al Centro *Esperanto-Kulturo-Ekologio*, pr. Mira 196-44, RUS-129128 Moskvo, Rusio: Tel +7/95/1870222, fakso 2926511.

La 79a UK okazos en Seulo, Koreio. Informojn pri Seulo vi ricevos de s-ro Lee Jung-Kee, direktoro de la Seula Esperanto-Kulturcentro, CPO Box 3047, 100-630 Seulo, Koreio; tel. +82/2/7795936, fakso 7564859.

Vidtelefono estas nia ĉefa produkto. Ni serĉas kunlaborantojn por grandigi la entreprenon kaj starigi internacian vendoreton. Prf. Dai Liming, Huasheng Group Co., Huada Corp., CN-519030 Wanzai Zhuhai, Guangdong. Fakso 0756/822421 kaj 821541.

Adresaron de Esperanto-uzantaj firmaoj el eks-SU kompilas s-ro Mikaelo Ĉertilov, "Esperanto-inform." pf. 111 Moskvo-Odincovo-6, RU-143000.

Esperanto-Centro de Slovaka Esperanto-Asocio transformiĝis en komerca kompanio. Ĝi interesiĝas pri ĉiuspecaj komercaj kaj turismaj proponoj. Adreso: SEA, Sobotske nám. 6, 08501 Poprad, Slovakio; tel. 092/32419.

Komerco podetala kaj pogranda; konstruado. *UTEŠTA*, a.k., Ĝenerala Direktoro: Kestutis Peikevičius, Tauragnu 54, Utena, Litovio. Fakso (037)039-69275.

Ofertas liberajn radojn por bicikloj. Ĉiaspeca importo-eksporto. Kontakta lingvo: esperanto. Sro Jindra Opršĉl. Loučná n./D. 74, CZ-78811; fakso +42/(0)649/94252.

Maŝinaj komponentoj diversaj - eŭropa kvalito - ĉio laŭ desegnaĵoj / dokumentado de kliento. PhDr. Bretislav Nevrlý, ARCO, Jana Šermy 1, CS-77200 Olomouc; tel. 29171.

Firmao "Detenina 12" komercas kun virinaj konfekcio, lanaĵoj, mantrikaĵoj. Maria Goranova, Tolstoj bl. 48., ap. 68, BG-1220 Sofio, Bulgario.


Internacia Vendo-Reto *Sortimento* (IVERS) invitas vin kunlabori, por multe profiti finance kaj ankaŭ morale! Detala priskribo de la projekto, aliĝilo kaj mendilo estas riceveblaj kontraŭ 2 irk-ĵ. Unika ebleco por utiligo de Esperanto kaj altiĝo de ĝia prestiĝo! Agentejo *Sortimento*, pf. 138, H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.

Turismo, artaĵoj (ekspozicio-vendado) reprezentado, eksporto de ŝafistaj hundidoj. Dir. M. Lineckij, Kultur-Komerca Centro *Esperanto*, pk. 539/1, UKR-254200 Kiev-200, Ukrainio. Tel: +7/044/4328777.

Ĉina entrepreno de mineralakvaj produktaĵoj serĉas modernan mineralakvan muntoĉenon, biermuntoĉenon, sukuntoĉenon. Ankaŭ serĉas kunlaboron tutmonde. Skribu en Esperanto al S-ro Vang Bing, Meicheng, Qianshan, Anhui, CN-246300 Ĉinio.

ANDALUZIAJ

POSTKARTOJ



Pregejo. ESTEPA (Sevilla)



ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO
Apartado 864
E-29080 MALAGA
Hispanio